


LA PONTO

Tweemaandelijks tijdschrift van de Limburgse Esperantovereniging.



Jaargang 2, nummer 2 (6), maart-april 2009
Verschijnt op de eerste dag van iedere onpare maand.
Erkenningsnummer: P808228
V.U.: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, 3940 Hechtel-Eksel
Tel. 011-73.20.47 – E-mail: pieter.doumen@skynet.be
Vanaf 15 maart : pieter.doumen@adsl4you.be

LA PONTO

Dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)
Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.
Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 1 N-ro 6 : marto-aprilo 2009
Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47
Retadreso: pieter.doumen@skynet.be

Redaktore

Karaj legantoj,

Kiam tiu ĉi numero aperas, printempo staras antaŭ la pordo. Ŝajnas, ke tiu ĉi vintro estis la plej malvarma ekde multaj jaroj. Ĝi ne volas finiĝi. Ĝi ankaŭ estos rememorita estontece kiel la vintro de la granda financa kaj ekono-mia tutmonda krizo. Multaj homoj perdis kaj perdas sian laboron. Multaj ankaŭ perdis sian ŝparmonon pro la disfalo de la akcimerkato. Akcioj montriĝis esti nur aerbalonoj. La kaŭzo: nelimigita avideco kaj troriskemo de la grandaj bankoj. Ni esperu, ke ili lernas el tiu krizo, kaj ke la krizo ne daŭros tro longe.

La kvinan numeron de nia revueto ni sendis al 110 esperantistoj (20 per paperpoŝto, la resto per retpoŝto). Ni denove ricevis plurajn pozitivajn reagojn. Sen voli trudi ĝin al iu ajn, ni pretas ankoraŭ pligrandigi tiun nombron, sed ni ne havas la retadreson de multaj esperantistoj. Memkompreble ĉiu rajtas sendi la revuon al aliaj esperantistoj.

Ni denove deziras al vi multan plezuron per la legado de tiu ĉi numero.

Jan Doumen

Lerni en virtuala lernejo

(Leren op een virtuele school)

Klasoj el la tuta mondo kunvenas en virtula lernejo, kie ili interparolas... Esperante.

Ĉu tiu lingvo, kunmetita antaŭ pli jarcento, tamen finfine atingos la publikan atenton?

Koncedu, la revo de Zamenhof estis grandioza: mondo, en kiu aldone al sia gepatra lingvo ĉiu parolus facile lerneblan duan lingvon. Per tio fine povus realiĝi interkomunikado, interfra-tiĝo de la homoj, unuiĝo de la mondo. Kaj ĉar neniu plu parolus sian propran lingvon kun alilingvanoj, ĉiuj parolantoj aŭ intertraktantoj starus ankaŭ sur egala nivelo.

Sed tio ne okazis. Cent jaroj poste la babilona lingvokonfuziĝo konsistigas la grandan maku-lon sur la tutmondiĝo de nia planedo. La lingvo kiu altrudas sin nun kiel universalan (interretan) lingvon estas speco de galimatia anglo. Ĉu ni tiam ne prefere dediĉus iom da tempo kaj energio al la lernado de Esperanto? Ekzemple en lernejo.

Ĉiaokaze tiel pensas la esperantistoj mem. Malgraŭ ke la lingvo ne trarompis, ilia entuziasmo por la mondlingvo estas nehaltigebla. Kontraŭ la ĝenerala konvinko, ili volas pruvi, ke temas pri pli ol espero per la virtuala lernejo *Tibor Sekelj*, tiel nomita laŭ hungara esploristo. Memore al li klasgrupoj interŝanĝas dokumen-taron kaj materialon kiel ludilojn, infangaze-tojn, sonkasedojn, fotojn kaj desegnaĵojn por kompari tiumaniere siajn vivkutimojn kaj vivmedion.

Klasoj el la tuta mondo rajtas partopreni espe-rantlingve en tiuj lecionoj. Ili estas reprezen-tataj en la lernejo per retejo. En la klasĉambroj la gelernantoj trovas informojn pri difinita klasgrupo, afiŝtabulon kun ĝeneralaj mesaĝoj, bibliotekon por konsulti ĉiujn dokumentojn, gazetbudon donantan aliron al interesaj inter-retruvooj kaj lingvolaboratorion, kie la geler-nantoj povas praktiki la instruitan lingvon. Plue ekzistas ankaŭ porinstruista ĉambro kun fakbiblioteko, sekretariato kaj direktorejo.

En la koridoro la gelernantoj povas ekspozicii la rezultatojn de siaj laboroj. Ĉio tio okazas kadre de la projekto *Interkulturo*, en kiu klasoj el diversaj kontinentoj kunlaboras kvazaŭ ili apartenus al unu sama lernejo. La projekto estas koordigata kaj mentorata de akademi-anoj ligitaj al diversaj universitatoj.

Por instruisto kiu deziras sperti, kio fakte estas Esperanto, la sekcio Gento de la Flandra Esperantoligo kunmetis amuzan diskedon. Sur ĝi troviĝas nombro da retejoj, kiuj klarigas la principojn de Esperanto per kelkaj simplaj reguloj. Ankaŭ estas programo, per kiu oni i.a. povas lerni la

bestonomojn en deko da lingvo, inter kiuj kompreneble Esperanto. Plue estas la paĝoj de FEL (en kvar lingvoj) kun diversaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj. Esperanto esta pli facila, ol oni pensas. Tiu lingvo havas tute logikan strukturon. Ne estas esceptoj al la maloftaj reguloj, kaj la lingvo estas konstruita el vortradikoj el la latinidaj, ĝermanaj kaj slavaj lingvofamilioj. Parolante Esperanton vi krome kontribuas al mondvasta ligo inter la homoj, al la disvastigo de baza demokratio, egaleco de ĉiuj homoj kaj al malfermiteco al ĉiuj kulturoj en la mondo. Ĉu ne estas belege, ke vi kiel instruisto kapablas transmeti ion tian al viaj lernantoj?

Willy Schuyesmans

Wikipedio bezonas kunlaborantojn

(Wikipedia heef medewerkers nodig)

La 21-an de novembro 2008 la Esperanto-versio de *Wikipedia* atingis la nombron de 107.007 artikoloj. Laŭ la ĝenerala statistiko ĝi situas sur la 22-a loko inter 264 lingvoj.

Por ke Wikipedio progresu, ne nur laŭ nombro de artikoloj, sed ĉefe laŭ kvalito kaj fideco, trejnseminarioj okazis antaŭ nelonge apud Prago kadre de la Konferenco pri Aplikado de Esperanto en Scienco kaj Tehniko (KAEST). Por faciligi la instruadon kaj trejnadon de kunlaborantoj, Yves Nevelsteen kreis, kadre de la plurlingva retejo a@i ([Edukado@Internet](mailto:a@i) :

<http://www.ikso.net/eo/index.php>), retejon <http://www.wikipedia.net>, kiu ebligas al interesatoj trovi helpon kaj kon-silojn. Interesatoj kaj informantoj trovos i.a. prezenton de la nova libro 'Wikipedio por vi' de Ziko van Dijk (60 p. en A5-formato), liston de asistantoj, konsilantoj kaj helpantoj: http://www.wikipedia.net/index.php/Teamo_de_asistantoj.

Kiel okaza kunlaboranto de Wikipedio, iom pli regula lastatempe, mi konstatas oftajn man-kojn. Pli bona kunordigado de la ekzistantaj kapabloj ebligis forigon de eraroj ortografiaj kaj gramatikaj, de malĝustaj informoj, komple-tigon de artikoloj, ktp. La iniciato de e@i estas tiurilate bonvena.

En mia lasta artikolo pri la bretona verkisto Emile Masson, mi same konstatis la mankon de almenaŭ bazaj informoj pri verkistoj, artistoj kaj politikistoj ktp. Ni tamen ne havu komplekson de malsupereco: mi ĵus rimarkis, ke laŭ la kataluna kaj hispana versioj Emile Masson mortis en Brest (lia naskiĝurbo), dum li fakte mortis en pariza malsanulejo.

Bonŝance, esperantistoj estas ne malmultaj, eĉ se malpli ol ni deziras. Ne neglektinda parto el ili havas kompetentecon pri difinita temo.

Artikolo pri urbo aŭ vilaĝo povas esti laboro de Esperanto-grupo aŭ tasko por progresantoj. Artikolo pri homo famiĝinta pro sia aktivado, profesia aŭ alia, povas esti laboro de persono loĝanta ie ajn, kiu interesiĝas aŭ emas esplori pri li aŭ ŝi. Faka artikolo estu prefere verkita de membro de faka Esperanto-asocio: http://eo.wikipedia.org/wiki/UEA_Fakaj_Asocioj. Jen bona tereno por pliriĉigi la vort-trezoron kaj stimuli la membrojn aktiviĝi!

Legantoj de Esperanto-publikiĝaĵoj kaj asociaj organoj en la tuta mondo povas proponi enciklopediajn artikolojn cele al aperigo en Viki-pedio. Se aperus en ĉiu numero pli-malpli longa kontribuajo, povus aldoniĝi al ĝi centoj aŭ eble miloj da artikoloj.

Tiu ĉi artikolo koncernas esence la disvolvon de la Esperanta versio de Wikipedio, kaj even-tuale la tradukon de artikoloj kiuj ekzistas nur en Esperanto, en aliajn lingvojn. La grupo

Internet@Education klopodas pli bone koordigi la redaktadon de artikoloj en Esperanto kaj formi

redaktistojn por la enpaĝigo de tiuj artikoloj. *(Laŭ Henri Masson, Francio)*

Esperanto en usonaj lernejoj?

(Esperanto in de scholen van de VSA?)

Ideas for a Change in America (Ideoj por Ŝanĝo en Usono) startis kiel tutnacia konkurso sekvanta la elekton de Barack Obama kiel nova prezidento por indiki la plej bonajn ideojn. De la 24-a de novembro ĝis la 31-a de decembro *Change.org* akceptis 7.875 propo-nojn de ideoj, inter kiuj ideo proponita de Oleg Izyumenko, studento el Lund (Svedio):



‘Enkonduki Esperanton kiel fremdlingvan lernobjekton en la lernejojn’. La tri plej popu-laraj ideoj de ĉiu el la 30 kategorioj de ideoj estis kvalifikitaj por la dua kaj fina voĉdono. La ideo de Oleg Izyumenko supervivis la unuan elekton, okupante la duan lokon en la sia kategorio Edukado. La dua elekto okazis de la 5-a ĝis la 15-a de januaro 2009. La 16-an de januaro 2009 *Change.org* kaj *Case Foundation* kune aranĝis kunvenon en la Nacia Gazetara Klubo de Vaŝingtono D.C. por anonci la 10 pintideojn. La ideo kun la plej multaj voĉoj estis ‘legalizi la medicinan kaj distran uzadon de mariĥuano’. Ĝi havis 19.790 subtenantojn! Dum la dua elekto la ideo ‘Esperanto kiel fremdlingva lernobjekto’ kolektis 3.625 voĉojn kaj ricevis la 22-an lokon el 90 elektitaj ideoj, kio certe estas bonega rezultato.

(Laŭ la interreto)

Nova blogo pri komputado kaj E-o

(Nieuwe blog over computer en Esperanto)

Interreto restas unu el la ĉefaj komunikiloj en la mondo. Ĝi estas speciale grava ankaŭ por Esperantoparolantoj, ĉar ili loĝas dise en la mondo, kaj danke al la retaj teĥnikoj ili havas la eblecon facile kontakti unuj la aliajn. Inter-reto kaj komputilo helpas venki landajn limojn kaj longajn distancojn. Krom tio, novaj teĥnikoj ofte faciligas nian ĉiutagan vivon: ili ŝparas al ni tempon, faciligas la laboron, helpas aŭto-mate ĉe rutinaj taskoj kaj faras aferojn multe pli rapide kaj en multe pli bona kvalito.

Ofte, ju pli sperta oni estas pri komputilaj aferoj en la nuntempa mondo, des pli efike oni povas funkcii en diversaj okazoj. Sed ne eblas en unu fojo ellerni ĉion. Se vi vere volas fruktodone labori kaj havi altkvalitajn rezultatojn, vi devas konstante sekvi la progreson. Kiuj novaj teĥnikoj ekzistas? Kiel tiuj teĥnikoj povas utili al mi? Kiel plej efike uzi ĉiujn ekzistantajn eblecojn? Tio estas multe da respondindaj demandoj.

Bedaŭrinde oni ne ĉiam havas sufiĉe da tempo por serĉi tiujn respondojn. Estus bone, se ili troviĝus kunigitaj sur unu loko. Ĝuste tial E@I decidis lanĉi novan projekton – la blogon

(<http://blog.ikso.net>), en kiu oni povas trovi interesajn informojn pri la komputilaj kaj retaj teĥnikoj, pri la evoluo de diversaj retaj projektoj ktp. Laŭplane en la blogo aperos diverstipaj informoj: iuj celos nur spertajn komputil-uzantojn, aliaj taŭgas ankaŭ por homoj kiuj havas nur bazajn sciojn pri la uzado de komputilo.

Se vi estas sperta ret- aŭ komputil-uzanto kaj volas dividi viajn sciojn kun aliaj esperanto-parolantoj, vi estas tre bonvena en la projekto. Ni volas kolekti grandan komunumon de redaktantoj de la blogo, ĉar ju pli da homoj kunlaboros pri ĝi, des pli bunta kaj interesa ĝi estos. Ankaŭ estas bonvenaj homoj kiuj okupi-ĝas pri projektoj rilataj al la temo de nia blogo (ekz. retaj projektoj, tradukado de iu programo ks.). En la nova E@I-blogo vi havos bonan eblecon informi la Esperanto-parolantan publikon pri via agado. Se vi volas kontribui al la projekto, sendu al blog@ikso.net etan sinprezenton kun indiko de tiuj temoj pri kiuj vi povas/volas helpi. Ni esperas, ke, se ni kun-ligos niajn fortojn kaj bone informos esperan-tistojn pri la nuntempa mondo, malgrandiĝos distancoj inter retaj kaj eksterretaj

komunumoj de esperantistoj, kaj tio signifas, ke la movado iĝos multe pli forta kaj efika. Kiom da esperantistoj kapablas ankoraŭ korekte skribi super-signojn? Ni devas ŝanĝi tion.

Bonvolu disvastigi tiun ĉi informon inter viajn amikojn kaj konatonj. Grandan antaŭdankon!

(*Jevgenij Gaus, jhenja@ikso.net*)

Nova internacia mon-unuo

(*Nieuwe internationale munteenheid*)

Antaŭ nelonge la Sennacia Banko lanĉis sian novan mondan mon-unuon: MONO. La evento okazis ĉe *Arcus Project* en Moriya, Japanio, okaze de la ekspozicio *Open Studio*, sabaton la 6-an de decembro 2008. La nuntempa valut-merkato kaŭzas grandan maljustecon en la mondo. Kial bovlo da supo devas kosti \$ 0,10 en iu loko kaj \$ 10 en alia? Tio estas preter la kompreno de la plimulto de la mortemuloj. Kaj ĉu interŝanĝi monon ne estas malpraktike, kiam oni vojaĝas? Mono antaŭenigas la internacian komercon, kaj samtempe reduktas la malegalecon inter la landoj. Baldaŭ kiam la homoj konscios pri la avantaĝojn de MONO, vi povos uzi ĝin ĉie en la mondo.



La desegnaĵo de la monbiletoj enhavas la por-treton de la iniciatinto de Esperanto, Ludwik Lejzer Zamenhof sur la antaŭa flanko, kaj helikon sur la malantaŭa. La devizo **Unu Mondo, Unu Lingvo, Unu Mono** delikate aperas en la fono. Por malebligi falsadon, la monbiletoj enhavas kiel sekurigojn specialan kotonon paperon kun koloraj UV-fibroj, fili-granon kaj numerojn. Por la intereso de la posedantoj de Monoj la Sennacia Banko saĝe investis la enspezon en novajn artprojektojn. La projekto estas subtenata de la Dana Art-komitato por Belartoj, *Akademie Schloss Solitude* kaj *Arcus Project*. Kiel lanĉ-oferto la monbiletoj estis vendataj laŭ la kurzo M 100 por Y 1000. Tio estas ĉir-kaŭ \$ 10 nuntempe. Tiel oni vendis M 1000, t.e. dek monbiletoj de M 100. La aŭkcio finiĝis vendredon la 15-an de januaro je la deka ptm GMT. Nun ni lasas al la libera merkato la taskon fiksi la veran valoron de la mon-unuo.

La lanĉo de Mono estis granda sukceso. Mi ŝatus danki ĉiujn investintajn kaj subtenantojn, kiuj verigas nian revon de monda mon-unuo. En la nomo de la Sennacia Banko mi deziras al vi ĉiuj jaron plenan de amo, paco kaj prospero!

Daniel Salomon,

direktoro de la Sennacia Banko.

Esperanto en la eŭro-parlamento (*Esperanto in het Europees parlement*)

Ĉi-sube mi sendas la tradukon de la tri propo-noj de Ljudmila Novak, oficiale transdonitaj hodiaŭ la 28-an de januaro al la Eŭropa Parla-mento reage al la diskuto pri la Raporto pri Multlingveco de Mouro.

Membrino de la Eŭropa Parlamento, Ljudmila Novak prezentis la 21-an de januaro 2009 en la Komitato pri Kulturo de la Eŭropa Parlamento sub la signo PE 416.668v01-00 kadre de debato pri la raporto/opinio pri multlingveco de Vasco Gracia Mouro tri proponojn pri ŝanĝoj en la artikolo 4.

Propono 4a. (Novak) konstatas, ke la principo de estimo de egalrajteco ne povas esti certigata dum oni uzas nacian lingvon (la anglon) kiel *lingua franca*.

Propono 4b. (Novak) proponas, ke konservante kaj uzante lingvojn, estimante la lingvan diversecon kaj stimolante la lernadon de diversaj lingvoj, oni pristudu la eblon kaj utilon de la enkonduko de

komuna artefarita lingvo en EU, ekzemple Esperanto. Nur ĝi povas faciligi interkompreniĝon en Eŭropo kaj kun loĝantoj de aliaj kontinentoj, ĉar ĝiaj lernado kaj uzo estas simplaj.

Popono 4c. (Novak) konstatas, ke la enkon-duko de la eŭro kiel komuna eŭropa mon-unuo, ege faciligis komercadon inter la diversaj ŝtatoj, helpis la ekonomian kreskon kaj pli-grandigis stabilecon en EU. Similajn efektojn povus havi ankaŭ la enkonduko de komuna komunika lingvo, kiu neniel forigos aŭ limigos la uzon de la naciaj kaj aliaj vivaj lingvoj uzataj en EU.

Senkonsidere de la sorto de la propono, estas grandega afero, ke iu deputito rekte proponis la aferon al la Eŭropa Parlamento. Kaj mi opinias, ke ĝi estas sufiĉe alloga por la gazetaro. Mi faris tion en Slovenio. Vi faru tion en via lando!

(Zlatko Tišlar)

Novajoj el Esperantio

(*Nieuws uit Esperantoland*)

1. Israelo. – *Vintra universitato.* - La Internacia Kongresa Universitato (IKU), kiu festis en Jokohamo sian sesdekan datrevenon, ĝis la jaro 1980-a estis nomita Internacia Somera Univer-sitato (ISU). Kial ne estu ankaŭ Vintra Univer-sitato?

Oni ŝanĝis la nomon ISU al IKU dum la Uni-versala Kongreso en Brazilo, kiu okazis en la vintro de la suda hemisfero. En la UK de Tam-pero en 1995 ni organizis la unuan komunan sesion de la Akademio Internacia de Sciencoj (AIS) kaj IKU. Pasintjare ni provis krei IVU, la vintran ekvivalenton de IKU, kiu samtempe estis studadsesio de AIS (fakte la AIS-sesio okazis trifoje en la pasinteco dum la Internacia Festivalo).

La ĉi-jara elekto de la temoj, kadre de la 25-a Internacia Festivalo en Düsseldorf (DE) estas denove varia. La prelegoj estas en la formo de tri AIS-kursoj, kiuj konsistas el po du prelegoj. Fine estos ebleco ekzameniĝi kaj akiri AIS-ateston. Informoj haveblaj en la retejoj:

<http://www.Internacia-festivalo.de/> kaj

<http://www.ais-sanmarino.org> .

(Amri Wandel, rektoro)

2. Italio. – *La filmejo Farbskatolo revigliĝas.* –

Ekde la fino de oktobro 2008 oni aldonis al la Esperanta filma retejo <http://farbskatol.net/> kvar filmetojn, produktitajn bonkvalite kaj originale en Esperanto.

Danke al la iniciato de la israela Esperanto-grupo LEEN (La Estonto Estas Nia) oni produktis tiujn ĉi kvar filmetojn iamaniere en itala etoso : humura, sed trafa recepto por *gnocchi di patate* (nudeloj el terpomoj) kaj bildstriaĵ-sonaj filmetoj el *I promessi sposi*

(La Gefianĉoj), la fama historia romano de Alessandro Manzoni.

Laŭplane aperos, dum la venontaj du monatoj, movadaj kaj turismaj filmetoj originale pro-duktaĵoj en Esperanto. Krom amuziĝo niaj filmeroj celas fariĝi helpmaterialon por la lernado de Esperanto.

Ni invitas vin viziti la TTT-ejon, voĉdoni kaj aldoni komentojn.

(Gian Piero Savio, esperantisto@live.com)

3. Rusio. – *Ilustrita enciklopedio pri bestoj.* –

Ĉe la moskva eldonejo Impeto denove aperis atentokapta eldonaĵo: “Ilustrita enciklopedio de hejmaj mamuloj”. Ĝi estas la dua en la serio de enciklopedioj. La unua eldonaĵo temis pri akvariaj fiŝoj.

La nuna libro, havanta belan koloran kovrilon, priskribas ĉirkaŭ dudek speciojn de mamuloj el diversaj ordoj kaj familioj, kiuj pli-malpli ofte renkonteblas en hejmoj kiel dorlotbestoj, kaj ankaŭ ĉirkaŭ 50 rasojn de hundoj kaj pli ol 20 rasojn de katoj, iliajn karakterizaĵojn kaj la kondiĉojn de hejma tenado.

Temas ankaŭ pri malsanoj de la bestoj, zoo-

higieno, bredado ks. Priskribon de la bestoj akompanas nigraj-blankaj ilustraĵoj. La Esperantaj nomoj de la bestoj estas provizitaj de la scienca (latina), angla, germana, franca kaj rusa tradukoj. En la fino estas indeksoj en tiuj lingvoj kaj tabeloj kun certaj biologiaj karakterizaĵoj de la priskribitaj bestoj.

Ĝin kompilis Nikolaj Gudskov, ĝin eldonis Impeto, en Moskvo, 2008, 240 paĝoj. Retejo de eldonejo:

<http://www.impeto.ru/ru/raznoe-na-esperanto> . La libro estas havebla ĉe UEA:

<http://katalogo.uea.org?inf=8129> .

(El Eventoj-Budapeŝto)

4. Pollando. – *La 94-a Universala Kongreso.* –

Ĝis la 15-a de februaro 1275 kongresanoj el 59 landoj aliĝis al la 94-a Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko, kiu okazos de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2009. En la sama dato la 93-a UK en Roterdamo pasintjare, kies fina nombro estis 1845, havis 1195 aliĝintoj. Ĉe la pinto de la provizora statistiko estas Pollando kun 219 aliĝoj, sekvas Francio kun 192 aliĝoj. Pli ol 100 aliĝojn liveris ankaŭ Germanio (114) kaj Japanio (112). El la aliaj landoj estis registritaj signife malpli grandaj nombroj. Pli ol 30 aliĝoj venis el Nederlando (53), Italio (46), Ĉeĥio (45), Belgio (42), Rusio (38), Brazilo (37) kaj Litovio (31).

Nekutime granda nombro da kandidatoj proponis prelegon por la 62-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato, kiu okazos dum la UK en Bjalistoko. Ĉi-foje UEA ricevis entute 30 proponojn, dum kutime en la lastaj jaroj la nombro estis ĉirkaŭ 20. La rikolto estas riĉa ankaŭ teme. Proponoj alvenis sur la kampoj de astronomio, etnologio, ekonomio, edukado, historio, interpretado, komunikado, lingvistiko, literaturo, matematiko, muziko, religio, turismo, esperantologio kaj zamen-hofologio. La Komisiono de IKU nun prijuĝas la diversajn proponojn por prepari rekomendon por la Estraro de UEA, kiu decidus pri la definitiva programo de IKU en sia kunsido fine de marto. La resumoj de la elektita prelegoj aperos sur la IKU-paĝoj de la UEA-retejo <http://uea.org/dokumentoj/IKU>, kie jam troviĝas prelegtekstoj de pluraj antaŭaj sesioj de IKU.

(Libera Folio, UEA)

Post nelonge aperos sub la titolo

RENARDO VULPO

la Esperanta traduko de la fama flandra bestepopeo "Van den Vos Reynaerde", verkita en ĉirkaŭ 1250 de nekonata poeto,

kiu nomas sin 'Willem (Vilhelmo) kiu

Madoke faris'. En tiu populara

majstroverko de la mezekopa flandra

literaturo la poeto rakontas, kiel la ruza

vulpo trompas la aliajn bestojn de la

arbaro. Kvankam pro liaj multaj krimoj li

estas kondamnita al la morto, li sukcesis

elturniĝi viva el tiu senespera situacio.

Pieter Jan Doumen tradukis tiun verkon

esperantlingven en 4.140 blankaj versoj,

provizante ilin per enkonduko kaj klarigaj


notoj. La teksto estas ilustrita per pluraj

akvofortoj de fama germana desegnisto.

La libro estas en A5-formato kaj enhavas

164 paĝojn. Prezo: € 15,00 + sendokostoj.

Havebla ĉe la tradukisto.



Gramatikajo: la artikolo (1)

(Grammatica: het lidwoord (1))

A. Kun komunaj nomoj

Legante esperantajn tekstojn, mi konstatas, ke la uzo de la artikolo ofte estas arbitra. Jen oni uzas ĝin sen neceseco, jen oni ne uzas ĝin, kiam ĝi estas necesa. Tial mi provas formuli kelkajn logikajn regulojn. La principo estas, ke

la artikolo estas uzata en Esperanto ĉiufoje, kiam persono, besto aŭ objekto estas difinita en la menso de parolanto kaj aŭskultanto. Neuzo de la artikolo egalas la uzon de 'iu' aŭ 'ia'.

Oni uzas la artikolon:

1. Kiam substantivo estas difinita per adjektiva komplemento:

Jen la filo de la direktoro. Prenu la libron kiu kuŝas sur la tablo. La ĉefurbo de Francio.

Sed se la direktoro havas plurajn filojn, la artikolo mankas.

Jen filo de la direktoro. Ŝi elektis bluan robon.

Ŝi elektis la bluan robon.

2. Se oni jam parolis pri la persono, besto aŭ objekto, tiel ke ĉiuj scias, pri kiu aŭ kio temas:

Nun la aŭto haltas antaŭ la kafejo. La polico arestis la bankrabistojn. La ĉevalo lamis.

3. Se temas pri persono, besto aŭ objekto, kiu estas unika en nia vivmedio:

La ĉefministro de Nederlando. La patrino estas en la kuirejo. La suno brilas kaj la ĉielo estas blua. Infanoj ludas sur la strato / la herbejo.

4. Ofte, sed ne devige, se oni prenas konkretan substantivon kiel simbolon de tuta klaso:

(La) rozo estas bela floro. (La) homa korpo estas kompleksa sistemo. Kio estas molekulo?

5. Se oni uzas konkretan pluralan substantivon kun la senco de "ĉiuj ... ĝenerale":

La virinoj kredas blinde (Z). La belgoj ŝatas pomfritojn. La birdoj kantas, la steloj brilas.

6. Se oni povas meti posedan aŭ montran pronomon antaŭ konkretan substantivon:

Li etendis la manon. La patro sidas en fotelo.

Mi konas la libron. Kiom patrino povas suferi!

7. Antaŭ adjektivo, orda numeralo aŭ poseda pronomo uzata sen substantivo:

La civila jaro komenciĝas la 1-an de januaro.

La plej miriga estas, ke la floroj odoras (K.).

*Li tradukis libron el la franca en la anglan.
(Daŭrigota)*

Aktivajoj de LEA

(Activiteiten van LEV)

A. Aktivajoj dum la pasintaj du monatoj

1. Ĵaŭdon, la 29-an de januaro 2009 sep lim-burgaj esperantistoj kuniĝis en la Kultura Centro *Poorthuis* de Peer por aŭskulti prelegon de Ben Indestege pri sia tioma vojaĝo tra Eŭropo, kiun li faris, kiel la antaŭajn, petvetu-rante kaj kun la libro de Pasporta Servo en la mano. Li kunprenis nin al Italio ĝis en ĝia piedfingro, Sicilio, resupreniris al suda Francio, Hispanio kaj Portugalio. De tie, sekvante la nordon hispanan marbordon, li reeniris Francion kaj reiris hejmen. Ĉie oni bone ricevis lin. En Italio bona sinjorino eĉ donacis al li cent eŭrojn. Nur tre malofte li devis preni aŭtobuson aŭ dormi en sia tendo. Dankon, Ben, pro via interesa rakonto!

2. Ĵaŭdon, la 26-an de februaro 2009, ses esperantistoj partoprenis en kvizo, kiun Henri Schutters kunmetis. Temo de la kvizo estis Esperantaj vortoj, kiun oni devis trovi dive-nante literon post litero. Estis du partoj. Henri gvidis la unuan, kiun gajnis Jan Doumen. Tiu ĉi devis gvidi la duan parton, kiun gajnis Henri! Sed ankaŭ la aliaj havis tre bonajn rezultatojn. Peter Meylaerts notis la poentojn sur la tabulo. Estis tre agrabla vespero.

B. Aktivajoj dum la venontaj du monatoj

- Merkredon, la 25-an de marto: kantovespero, gvidota de Paul Hotterbeekx kaj Jan Doumen. Kantlibron ankoraŭ ĉiam havebla ĉe Jan.

- Merkredon, la 29-an de aprilo, An Olijsla-gers denove gvidos skrabloludon, uzante pro ĝi la Esperantan version.

Ĉar la lokalo pri kiu ni povas senpage disponi en la *Poorthuis* de Peer, estas bezonata por la kurso, la kunvenoj de LEA provizore okazos ĝis la somerferioj je la lasta merkredo de ĉiu monato en la loĝoĉambro de sekretario Jan Doumen en Hechtel.

Per tiu ĉi vojo ni denove volas alvoki ĉiujn limburgajn esperantistojn kaj simpatiantojn partopreni en niaj kunvenoj! Venu kaj aliĝu al nia nuna malgranda, sed entuziasma grupo!

<p>Atentu! La 15-an de marto ŝanĝiĝos la retadreso de Pieter Jan Doumen. La nova retadreso estos pieter.doumen@adsl4you.be</p>
